

N. N. 32, Burĝonis roz- zarbedo	N. N. 32, Es ist ein Ros ent- sprungen	N. N. 32, Elkreskis roz- branĉeto	N. N. 32, Jen ĉiamviva Rozo
<i>tradukita de Guido Holz</i>		<i>tradukita de Joachim Gießner</i>	<i>tradukita de Leland Bryant Ross</i>
1. Burĝonis roz- arbedo el delikata sin' laŭ olda kant-heredo, Jiŝaj la origin'; ekĝermis ĉarma flor' dum frosta vintro- tempo je noktomeza hor'.	1. Es ist ein Ros entsprun- gen aus einer Wurzel zart, wie uns die Alten sungen, von Jesse kam die Art und hat ein Blümlein bracht mitten im kalten Winter, wohl zu der halben Nacht.	1. Elkreskis roz- branĉeto el rozarbust' de Di'. Aŭguro de profeto rakontis jam pri ĝi. Naskiĝis rozfloreto' meze en vintra nokto laŭ diro de profeto'.	Jen ĉiamviva Rozo laŭ vorto de profeto' El la Jiŝaja ŝoso ekkreskis kun im- pet'. Ĝi venis, hela Flor', en frida tempo vin- tra Je noktomeza hor'.
2. El virgulin' beata, mirinda roz-arbedo', elvenis flor' benata laŭ diro de profeto'. Laŭ sankta Di-ordon' ŝi naskis infaneton por nia sav' kaj bon'.	2. Das Röslein, das ich mei- ne, davon Jesaja sagt, ist Maria die reine, die uns das Blümlein bracht. Aus Gottes ewgem Rat hat sie ein Kind geboren und blieb ein reine Magd.	2. Ja naskis tiu rozo - Jesaj' prognozis ĝin - el sia korpo sproson Mari' la virgulin'. Laŭ dipotenco vol' ŝi naskis Di-infanon por tuta mondo' kon- sol'.	Jesaja ĝin anoncis, la menciita Flor'; Maria ĝin responsis el patrin-ama kor'. Ŝi naskis Rozon por klarigi Dian amon Je noktomeza hor'.
3. Kaj ĉi floreto belas, amindas per parfum'; la nokton ĝi forpelas per sia brila lum', nin helpas el mizer', el pek' kaj morto sa- vas; Li, hom' kaj Di' en ver'.	3. Das Blümlein so kleine, das duftet uns so süß, mit seinem hellen Scheine vertreibt's die Finsternis: Wahr' Mensch und wahrer Gott, hilft uns aus allem Leide, rettet von Sünd und Tod.	3. Kaj tiu belfloreto tre hele lumas ĝi. Obskuron la brileto forprenas nun de ni. Vi hom' kaj vera Di' el pekoj kaj suferoj estas savanto' por ni.	Ĉi tiu milda Floro per sia dolĉ-aromo' Heligas per Digloro la vojon de la hom'. Ja homo, tamen Di', ĝi ŝarĝojn malpezi- gas Kaj homojn savas ĝi.
...

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de GUIDO HOLZ (*1920 – †1989).

Arg-618-1245 (2014-09-07 14:38:29)

Tiu ĉi kanto troviĝas en la eklezia Esperanta kantlibro “Adoru”, n-ro 223. Vidu ankaŭ la retejon <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/b/burgxonis1.html>. Pri Guido Holz vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido_Holz.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas N. N. 32.

Arg-618-1243 (2012-10-18 21:49:44)

Tiu ĉi kanto-teksto troviĝas en la germana evangelia eklezia kantlibro, kanto n-ro 23. Vidu ankaŭ la retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Es_ist_ein_Ros_entsprungen. - La teksto troviĝas ankaŭ en la retejo <http://ingeb.org/spiritua/esistein.html>. Tie estas aŭdebla ankaŭ la melodio.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).

Arg-618-1244 (2012-10-18 21:24:22)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>. sub <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de LELAND BRYANT ROSS (Ros’ Haruo).

Arg-618-1247 (2014-09-08 13:06:28)

Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/j/jencxiamv1.html>. Pluaj tradukoj de la sama aŭtoro troviĝas sub http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros_h.html. Pri la tradukinto vidu la facebook-paĝon <https://www.facebook.com/leland.ross/photos>.